

Sekr.: Ing. Jan Werner, . Kroftova 84, Brno 16, Ĉeĥoslovakio

Gaston Waringhien

Esperanto en la evoluo de moderna penso

Esperanto /UEA/, majo 1971 fragmento el parolado dd prof.
G.W., la prezidanto de la Akademio de Esperanto

"... Ni memoru ekzemple, ke la matematike ĝusta kaj socie bona reforma de la gregoria kalendaro de 1582 estis akceptita de Anglujo nur en 1752, de Rusujo nur en 1918; la astronomian malkovron de Galileo pri la rondiro de la planedoj ĉirkaŭ la suno estis permesita instrui en Romo nur en 1822; la abolicio de sklavigadoj, kiun Grotio kiel la unna postulis kiel juran rajton post dek ses jarcentoj da kristanismo, estis proklamita en Anglujo nur en 1833, en Francujo nur en 1848, en Usono nur en 1865 kaj ni ĉiuj scias, ke ĝi ne tute malaperis de sur la supraĵo de la tero; la alia granda penso de Grotio, la starigo de internacia arbitracia kortumo, realiĝis nur en 1899 - kaj sub kiaj limigitaj kondiĉoj! Interspaco de du aŭ tri jarcentoj ŝajne estas necesa, por ke tiuj evidente bonfaraj reformoj ricevu komencon de efektivigo. Kaj nia Esperanto estas apenaŭ okdekjaraĝa! ...

Nia sola malamiko /.../ estas la malfido de la granda publiko kontraŭ ĉia lingva novaĵo; kaj ĝin ni povos puperi nur per la fondado de propra tradicio, per la konstanta demonstrado, ke ni vivas kaj aktivis, per senmanka eltenado trans la jardekoj kaj, senecese, trans la jarcentoj. Ni ne faru al ni iluziojn pri la apogo de la registaroj: la lingvon internacian ili oficialigos, ĝuste kiam ĝi ne plu bezonos ilian agnoskon, ĉar ĝi estos jam uzatade ĉiuj homoj kaj sur ĉiu kampo. Ni ne faru al ni iluziojn; pri la facileco propagandi la esperon, kiu kuŝas en niaj koroj same kiel en la nomo mem de nia lingvo /.../ Ŝajna paradokson en la tempo, kiam multigas la atingitaĵoj de la sciencoj, tiam malkreskas la emocii pensadi libere kaj racie. Iu ajn semajna revuo malfermas siajn paĝojn al la ĥimeroj de la fakiroj, astrologoj kaj aliaj ĉarlataĵoj senkompareble pli facile ol al studoj pri la malsato en la mondo aŭ al la batalo kontraŭ la nesciado, - mi eĉ ne parolas pri la problemoj de la lingvoj. Kaj tamen, se ni volas, ke tiu ĉi estu iam solvita, ne ekzistas por ni alia vojo ol la persona klopodado en ĉiuj medioj, ol la pacienca, persista kaj penplena varbado de novaj samideanoj. Ĉio, kio estas farata en ĉi mondo, diris Lutero, estas farata per espero. Kaj la ekzemplon montris al ni Zamenhof: neniam li konsentis cedi al pesimismo; al ĉiuj batoj de la sorto li respondis per pliaj fortostreĉoj; kaj ĝis la fino, en la plej tragikaj cirkonstancoj, li konservis neŝancelebla sian fidon al la lingvo internacia kaj al la intergenta paco - luma idealo, kiu trans la franca, la germana kaj la hebrea prismoj, orientis lian spiriton kaj bruligis lian koron, kaj kiu restas plu por ni, liaj disĉiploj, la plej potenca instigilo kaj refortigilo en nia longa, longa provado akceptigi al babeligita homaro la savan rimedon de interkompreniĝo."

Kion signifas la PLENA ILUSTRITA VORTARO por teknikistoj?
La TS entreprenis laborojn pri ĉeĥa-esperanta teknika vortaro

Sendube gravan progreson alportis la PIV. En ĝi koncentriĝis teknikaj terminoj ĝis nun dissemataj en diversaj terminaretoj, ne-publikigitaj materialoj ktp, ofte tre malfacile haveblaj kaj ĝene uzeblaj. Ofte ni plendas pro malbona stato de teknika Esperanto. Sed relative riĉa estas jam la teknika lingvo, nun oportune registrita en la PIV. Tamen - la formo de la PIV /leksikono sole en Esperanto/ ne permesas ĝian senperan kaj sekuran uzon, kiam oni serĉas esp.terminon por ĉeĥa/slovaka/ esprimo.

Tial necesas prilabori la teknikajn terminojn de la PIV en formon de ĉeĥa-esperanta vortaro, por ke ni

- 1/ konstati kaj ekkonu la nunan lingvostaton, kies la PIV estas la plej grava prezentanto,
- 2/ uzebligu la PIV-on por teknika verkado en Esperanto, tradukado k.s.,
- 3/ kreu - per perfekta kono de l'PIV - la bazon por plua evoluigo de la teknika lingvo,
- 4/ starigu bazan etapon por kreado de unueca teknika ĉ.-esp. sliparo, kiu estos la fundamento por estontaj specialaj aŭ por plena teknika vortaro.

La TS de ĈEA serĉas kunlaborantojn el plej diversaj fakoj por principe du tipoj de PIV-prilaboro:

- 1/ legi sisteme determinitan parton de l'PIV kaj surslipigi ĉiujn teknikajn /aŭ ĉiujn el iu fako/ esprimojn, laŭpove traduki ilin en la ĉeĥan/slovakon. En kazo, kiam vi ne scios la ĉeĥan/slovakon ekvivalenton, alia specialisto kompletigos la slipon.
- 2/ kontroli kaj kompletigadi jam duonpretajn en sia specialfako. Tiu ĉi kunlaboranto ne bezonas jam legi tutan PIV-on, sed nur la terminojn kaj ties difinojn, laŭ ricevitaj slipoj. Precipe tiuj ĉi kunlaborantoj povos kontentiĝi per portempe pruntebla PIV-ekzemplero de TS de ĈEA.

Kvar membroj de la TS ĝuste komencis la sisteman-prilaboradon de PIV, provizore en larĝa fako konstrua. Tiel estas metita la angulŝtono por la Centra Teknika Sliparo /CTS/ ĉeĥa-esperanta kaj por Teknika Vortaro ĉeĥa-esperanta. Pluaj kunlaborantoj estas tre dezirataj, ankaŭ el aliaj fakoj. Povoscio de Esperanto sufiĉas almenaŭ por kompreni la difinojn en la PIV.

Detalajn informojn, konsilojn ktp sendos al ĉiu interesiĝanto la komitatano: Inĝ. Aleš Bednařík, Svatoplukova C/6, SENEK, okr. Bratislava - vidiek.

Renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj en VSETÍN
24 - 27 Septembro 1971

En kadro de la renkontiĝo okazos kunsidoj de sekcioj el ambaŭ asocioj, nome dimanĉe la 26-an de sept, je la 9-a horo en la Kulturdomo "Sklář", kaj "Lidový dům". TS de ĈEA aranĝos debat-kunvenon pri aferoj ligitaj kun ellaboro de ĉeĥa-/slovaka-/esperantaj teknikaj terminaroj. Via ĉeesto dezirata! Aliĝoj ĉe: A. Berka, Vsetín 1423.

2. návrh Organizačního řádu naší sekce

byl zaslán Českému-esperantskému svazu v Praze k projednání a schválení dne 28. června 1971.

Bibliografio de teknikaj verkoj en Esperanto

Prilaboro de la bibliografio postrestas la planon el 1970, precipe pro manko de kunlaborantoj. Relegu la artikolon en la 3-a n-ro de "TS de ĈEA informas"/Okt.1970/ kaj prikonsideru vian helpon. Informu pri via pozitiva decido la sekretarion.

MÁME "PIV"-! Koupili jsmo pro ĉleny sekce slovník "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto". Slovník pŭjĉuĵe Ing.A.Bednařík /adresu viz výše!/. Pŭjĉovní podmínky otiskneme příště.

Protoĵe, vřak finanĉní prostředky k jeho zakoupení byly pŭjĉeny jedním pracovníkem sekce, prosíme Vás o pŕispěnění finanĉní ĉástkou dle Vařích moĵností. /Cena 900 Kĉs/. Pŕípadný pŕebytek pŕevedeme na vydavatelský fond TS; Děkujeme. /Pŕíspěvky pošlejte pořt.poukázkou na adresu jednatele – viz záhlaví na 1.straně/.

Teknika kristaligado

En la Eŭropa federacio de kemiingenieraj sciencoj estis en 1970 establita Grupo por kristaligado /teknika preparo de kristaloj/. Sekreteriejo de la Grupo estas en ĈSSR la sekretario estas kunlaboranto de TS de ĈEA! Li peras informojn ankaŭ en Esperanto. Adr.: Inĝ. Rudolf Rychlý, C.Sc., Explora Instituto de Neorganika Kemio /VŪAnCH/, Revoluĉní 86, Ústí n/Labem, ĈSSR.

Vidu la artikolon en "Scienca Revuo" n-ro 3 /89/ el majo 1971.

PIV kaj la kemia terminologio

Inĝ. Zdeněk Pluhař ellaboris ampleksajn kritikajn notojn pri PIV koncerne ĥemiajn terminojn disponiginte ilin al TC /Terminologia Centro/ de ISAE kaj aliaj gravaj organoj kaj personoj. Per tre kompetenta maniero la kritikanto rimarkigas al kelkaj difinoj de ĥemiaj terminoj, kiuj estas neprecizaj aŭ tro arĥaikaj, eventuele tro popularaj kaj al kelkaj senutilaj neologismoj. Estas grava manko de PIV, ke nomenklaturado de neorganikaj kombinaĵoj estas prezentita per neunueca apliko de finaĵoj -oz kaj -ik, kio estas malfacile scienca argumentebla. En naciaj nomenklaturadoj estas pli kaj pli uzata la moderna nomenklaturado numeralo. Simile, en organikĥemia nomenklaturado, PIV preskaŭ nenie prezentas almenaŭ dualoke sistemajn nomojn de kombinaĵoj, kies progresemeco estas senduba. Zd. Pluhař pledas ankaŭ por la sono ĥ, kiu en PIV preskaŭ malaperis favore al pli "moderna" k. Ĉu fakte ekzistas objektivaj kaj seriozaj kaŭzoj por forlasado de la fundamentaj ĥ-formoj?

Post sisteme listigitaj notoj al ĉ. 360 kapvortoj de PIV Zd. Pluhař konkludas, ke "se oni volus preni PIV-on kiel fundamenton de unuopaj fakaj nomenklaturadoj, tiam PIV nepre devas esti starigita sur firman unuecan bazon, prezenti nociojn el unueca kaj sistema vidpunkto kaj difino ilin moderne. Al tiu ĉi lasta postulo PIV relative multon ŝuldas, almenaŭ en ĥemio."

Mi rimarkas, ke la neunuecon kaj mankon de sistemece Haferkorn konsciis, li menciis tion en la antaŭparolo. AB

SLIPARA VORTARO. Rüdiger Eichholz /Kanado/ eldonis la trian ĝeneralan serion kaj la unuan specialan /kemi-fizikan/ serion de slipoj por la Slipara Vortaro ilustrita, kiu servas kiel prepara ŝtupo al la eldono de la bildvortaro DUDEN. La sliparo estas abonebla. /Esp-o, UEA, n-ro 785, 4, aprilo 1971/.

SCIENCA TRADUKSERVO. La estraro de UEA en aprilo 1971 aprobis proponon pri starigo de Scienca Tradukservo, kun la celo kolekti

kaj disponigi esperantajn tradukojn de sciencaj artikoloj.

"Der Chemischreiniger und Färber", la germanlingva monata gazeto ŝanĝis sian titolon al "Chemischreiniger-Wäscher-Färber-Zeitung" /Gazeto por sekpurigistoj-lavistoj-tinkturistoj/. Jam kvar jarojn ĝi enhavas i.a esperantlingvajn resumojn. Adr.: Verlag Walther de Bouché, 8 München 13, Elisabethstr. 36, BRD.

El la letero de I. Andreev /Bulg., 30.5.1971/, funkciulo de la Tekn. Ligo de ISAE: "... La bulteno de la ĉeĥoslovaka sekcio eble iom post iom povos iĝi internacia gazeto, se estos kontribuaĵoj el diversaj landoj. En ĝi povus jam aperi terminoj el apartaj fakoj kaj koncizaj verkoj pri diversaj teknikaj branĉoj. . "

TS de ĈEA: Malfacila estus la tasko eldoni priteknikan gazeton kaj kontentigi fakulojn de ĉiuj branĉoj. La temoj devus esti plejparte interdisciplinaj aŭ plimalpli popularsciencaj. Provizore ni strebas nur pri kontaktilo enlanda, aŭ plurlanda, se montriĝos intereso simila al via bulgara ekzemplo.

El la letero de G.D.Dokov /Bulg., 1.6.1971/, funkciulo de la bulgara TS: "...Por nuna momento estus utile, se via informilo fariĝus bazo por niaj landoj, eble ankaŭ por Hungario, kiuj havas la samajn sekciojn. Ni sendos al vi la necesajn materialojn por meti ilin post la viaj. Ĉar ni estas ĉirkaŭ 30 personoj, eventuale 60 kune kun tiuj en la provinco..."

TS de ĈEA: La proponon ni akceptas.

K I E L N I D I R U ? /prilingva diskuto/

DRAGMAŜINO - ELKAVATORO. Jen kontribuaĵo de I. Andreev /Bulg./:

En la bulgara lingvo ekzistas vortoj: bager - maŝino por elpreno de tero, sablo, gruzo k.a. el fundo de rivero aŭ kavaĵo; eks-kavator - maŝino por elfosado kaj forigo de tero, elpreno de likvaĵoj, nutraĵoj /greno k.s./; draga estas flosanta maŝino por purigo de akvobasenoj. Ĉefe temas pri havenoj kaj flosterenoj de riveroj. Konklude mi opinias, ke BAGRO povos enteni la du unuajn nociojn, t.e. elfosado kaj forigado de grundo, farata ĉe diversaj konstrulaboroj kaj akirado de karbo kaj aliaj minaĵoj. DRAG/MAŜINO estas uzata por laboro en akvobasenoj ĉu por purigado de la fundo, ĉu por akirado de sablo, gruzo k.s. el la fundo... Bagro estos la plej trafa elekto. Ĝi havas internacian aplikon, estas facile manipulebla kaj klara. - /Red.: La diskuton ni supozas fermi en la venonta n-ro/.

NE LENTO, SED LENO ! Pro misretajpo de la fragmento el la letero de R.Eichholz ni en la pasinta numero erare menciis "lento". Ĝuste devas esti LENO /laŭ la angla "lane", elparolu len/. Ni petas pardonon. Anstataŭ "triveturlarĝa ŝoseo" estas uzebla "trilena ŝoseo" k.s. - Ankoraŭ I.Andreev al la afero: "...laŭ principo de sufiĉo, parolante pri ŝoseo kun kelkaj veturlarĝoj, oni povas ellasi la vorton "vetur". Tiel ni havos: unularĝa, dularĝa, trilarĝa ŝoseo."

MALEEBLA GIS/FER/O ! - estas giso formebla per maleo. MALE/O laŭ PIV: 1 Ligna dukapa martelo, kun pli-malpli longa tenilo, uzata de lignaĵistoj, de krocketludantoj, /metala/ de kirurgoj ktp, 2 - 4 nocioj eksterteknikaj. MALE/I /tr/: Platebenigi per maleo: -i blankan gison, plumbon; -ebla metalo. - Ankaŭ akceptita de Waringhien en Grand Dictionnaire E-F /1957/ kaj Butler en E-A Dictionary /1967/.

Maleebla giso /ĉeĥe: temperovaná litina/ kaj maleebligo /aŭ maleeblizo/ respondas al la franca "malléabilisation", la itala

"malleabilizzarione", rumana "malleabilizare. La angla "malleabilizing" estas uzata nur en la kazo de la usona metodo, grafitiza, /temperovaná litina s černým lomem/, dum por la eŭropa metodo, dekarboniga, angloj uzas "decarboniring" /temperovaná litina s bílým lomem/.
Laŭ K.F.

GLITKESTA SKAFALDADO ? "Hungara Vivo" n-ro 1/1970 /Okt./, pĝ. 27, raportas pri "La plej granda fridigo-turo en Eŭropo". En la artikolo estas uzita termino "glitkesta skafaldado" /tažené bednění/ laŭ PIV estas SKAFALDO: Provizora konstruo el traboj aŭ stangoj k. tabuloj, kiun oni starigas ĉirkaŭ konstruata aŭ riparata domo, por ebligi al masonistoj, marŝmiristoj ktp fari sian laboron. SKAFALD/I /ntr/: Starigi skafaldon. Ĉe la menciita teknologio ligiĝas "kestajo kun skafaldo en unu samtempe levata tuto. Sed teknologion principe determinas la muldila meĥanismo. Oni do distingu:

S , ĉ: bednění, A: casing, F: coffrage, G: Schalung, kaj SKAFALDO, ĉ: lešení, A: scaffold, F: échafaud, G: Gerüst

La unua laŭ PIV: muld/ilo = ujo, en kiun oni enpremas la muldan materialon: muldilo el argilo, el ŝtalo, el tabuloj por betono; bakmuldilo /de kuko/; sablomuldilo.

"Muldilo" konvenas por /ĉ/ FORMA, MATRICE /A: mould, F: moule, G: Form/, sed ne konvenas por la konstrua ekipaĵo, ligna, ŝtala k.a., aŭ por ligna ĉarpentaĵo, helpe de kiu oni formas betonan konstruaĵon. Post prikonsidero de la problemo mi trovas du solvojn:

- 1/ KESTI /tr/ - pretigi formon por /fer/betona konstruaĵo
KESTAĴO - a/ ekipaĵo por kesti, b/ el pecoj starigita formo de konstruaĵo aŭ ties parto por muldi ĝin el betono.
- 2/ KOFRI /tr/ = kesti, KOFRAĴO = kestaĵo

Do, anstataŭ "glitkesta skafaldado" estus "glitkestado" aŭ "glitkofrado" /aŭ pli bone LEV-, TIR- ?/. Via opinio?

TEREBENIGA MAŜINO ? I.Andreev: Terfosa maŝino uzata por elfoso kaj disportado de grundo kun la celo ebenigi terenon. Ĝi estas uzata ĉefe ĉe konstruado de ŝoseoj. La angla nomo estas "grader". Mi simple nomis ĝin "terebeniga maŝino". En la bulgara kaj rusa lingvoj estas uzata la angla vorto laŭ la prononco, nome "grejder". Kiel en Esperanto?

Respondo: "terebeniga maŝino" estas ĝusta kaj uzebla esprimo. En la preparata nomenklaturado de terfosaj maŝinoj mi uzas EBENATORO. La teknikan sufikson -ATOR s-ro A. Broise rekomendas kompreni kiel IG-MAŜINON. Simile: /el/kavatoro, dragatoro, ŝarĝatoro, stakatoro, skarifikatoro, plugatoro, skrapatoro. /Sed dozero/.

FAKAJ KONTAKTOJ /eluzu la rubrikon!/

S-ro Georgi D. Dokov - teknologo de plasto, dez.kor.kun samfakuloj. Adr.: 35, Jordan Kiskinov Str., SOFIA 5, Bulgario

Fake kontakti deziras instruisto de fiziko: S-ro Brone Auk-ŝtilkniené, Pasvalys, J. Janonio 27, Litovio, USSR

Verketon pri TERMIKO /scienco pri varmo/ en E. preparas kaj pri fakterminaj aferoj deziras konsulti kun samfakuloj internacie: Inĝ. JUDr. Miroslav Tůma, Krásného 35, BRNO 15, Ĉeĥoslovakio

KELKAJ TERMINOJ LAŬ PIV, mankantaj en Plena Vortaro kaj Suplem.
ab/ FIZIKO - Vortero antaŭ unuoj, kun signifo "absoluta"; ekz. =ampero (la unuo de la kurent-intenso en la absoluta elektromagneta mezursistemo aŭ CGS-sistemo); =volto (la unuo de la tensio); =omo (la unuo de la rezistanco) ktp. Referenco al: absoluta.
abatis/o MILITAFEROJ - Baraĵo, farita el dehakitaj arboj.

acetoliz/i (tr) KEMIO - Dismeti per aceta acido.

adher/i (ntr) FIZIKO - Supraĵe gluiĝi sur io; supraĵe fiksiĝi pro ia speciala forto: la du randoj de la vundo =is; en la armita betono la fero =as al la betono. =o. Forto inter du diversspecaj substancoj, devenanta de molekula altiro. =o povas ekzisti inter du solidoj, inter solido k likvo aŭ inter du likvoj. Referenco al: kohero. =a. Tia, ke ĝi =as: =a rubando. (referenco al: sparadrapo). =aĵo MEDICINO - Okaza algluiĝo de du apudaj histosurfacoj.

adsorb/i (tr) KEMIO - Sorbi sur la surfaco; malforte ligi gason aŭ fluidaĵon al iu substanco: karbono =as multajn substancojn; =izotermo, =okoefero. =eco. Povo de absorbado. =ilo. Substanco, kiu povas =i.

aerodin/o AVIADO - Ĝenerala nomo por iu ajn aviadilo, kiu estas pli peza ol la aero, k kies subteno en flugado pliparte rezultas el aerodinamika forto. Referenco al: aerostato.

aerofor/o TEKNIKOJ - Aparato ekipita per premaerujo (pneŭmatika ujo), servanta por savado.

aerofram/o AVIADO - Flugmaŝino sen motoro.

aerostatik/o FIZIKO - Tiu parto de la meĥaniko, kiu pritraktas la ekvilibron de gasaj korpoj. Referenco al: aerodinamiko, pneŭmatiko.

TS de ĈEA informas - aperas neregule - senpaga Sept.1971, n-ro 5
